

# QUANCO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

2/05

APRILIO - JUNIO



**Oficiala Organo de  
Kuba Esperanto-Asocio**  
(2/2005, aprilo – junio)  
Aperas 4-foje jare

Eldonas:  
Kuba Esperanto-Asocio  
Poŝtako 5120,  
10500 Havano, Kubo  
Telefonoj: ++53(7)40 4484  
kaj 53 9102  
Fakso: 643 8729  
Retadreso:  
avanco@esperanto.co.cu

Ĉefredaktoro:  
NORBERTO DÍAZ GUEVARA

Revizias kaj kontrolas:  
JULIÁN HERNÁNDEZ ANGLUO  
ALBERTO FÓEZ-CALIENES BARRIOS  
MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ  
JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ

Enpaĝigo:  
NORBERTO DÍAZ GUEVARA

Reproduktado permesata  
Interŝango dezirata.

**La kovrilo:**

*Maritza Gutiérrez González, estrarano de Universala Esperanto-Asocio pri Landa kaj Regiona Agado kaj Kasistino de KEA, malfermas la 5an Nacian Kongreson de Esperanto, en la Muzeo pri Historio de la Sciencoj Carlos J. Finlay, en Havano, la 3an de marto 2005. Foto: Norberto Díaz Guevara*

## estimata leganto

*Permesu prezenti min kiel vian novan ĉefredaktoron: Mi estas 46-jaraĝa elektro-inĝeniero loĝanta en Sancti Spiritus, en la centro de Kubo. En 1986 okazis mia konatiĝo kun Esperanto, kaj mi okupis diversajn postenojn en la estraro de la Provinca Filio, kies sekretario mi nun estas. Tiu ĉi estas mia unua numero de Avanco, kiun mi esperas teni en granda prestiĝo samkiel tion faris miaj antaŭuloj.*

*Samkiel kongresoj vivas, ĉar ekzistas kongresanoj (p. 3), periodaĵoj vivas, ĉar ekzistas legantoj. Mi esperas, ke niaj rilatoj estos fruktodonaj por la viveco de Avanco, kiu estas malferma al viaj reagoj kaj kunlaboroj.*

*Avanco kongrese vestas sin ĉi-foje. Se vi maltrafis la 5an Kongreson de Kuba E-Asocio, vi nun havas la ŝancon scii pri ĉio kio okazis en la pinta aranĝo de la Kuba movado. Aparta speciala rekomendo estas la intervjuo kun Maritza Gutiérrez González, UEA-estrarano pri Landa Agado.*

*Agrablan kaj nutrivan legadon! Kun Avancaj salutoj,*

  
NORBERTO DÍAZ GUEVARA

## enhavo

**Kongresoj kaj kongresanoj**

NORBERTO DÍAZ GUEVARA

3

**Utiligo de Esperanto en internaciaj rilatoj**

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

4

**La kongreso resume**

ALBERTO FERNÁNDEZ CALIENES

7

**Pripensoj rilate al esperanto-instruado**

MARTÍN CASTRO LÓPEZ

8

**Demandaro por la distanca kurso**

MARTA ALONSO GUTIÉRREZ

9

**Intervjuo kun... Maritza Gutiérrez González**

NORBERTO DÍAZ GUEVARA

12

**Novaĵoj el filioj**

DIVERSAJ

13

**Literaturo: "Lasta akto"**

RUBÉN MARTÍNEZ VILLENA

14

## Kongresoj kaj kongresanoj

Estas notindaj diferencoj inter danĉfestoj kaj kongresoj. Kompreneble. Ĉeestantoj al la unuaj atentis ĉefe pri la ŝatataj vesto kaj akompano! Por la festo mem necesas nur muziko infere laŭta kaj eventuale iom da alkoholaĵo. Ĉio alia estas korpa movo eĉ se ĉeestus unu paro.

Kongresoj estas iom pli komplikaj aferoj. Kompreneble. Eĉ la konsistigo de la kongresa organizantaro estas fonto de maldormo. Sed ni okupiĝu pri la kongreso mem, kiu ja ne povas okazi sen kongresanoj. Ili, do, estas nepra parto de kongreso, kies planita programo povas esti bunta kaj tamen la 5a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio havis varian kaj abundan programon por 104 kongresanoj. Prelegoj, diskutrondoj kaj laborkunsidoj rilatis al la temo "Esperanto: realo kaj estonteco". Kaj realo estis, ke la diligentaj kongresanoj sidis en la salonoj dum la programeroj. Bedaŭrinde plejparto el ili restis silentaj post la prelegoj, tiel ke la riĉigaj debatoj ofte mankis. Ĉu pro tio, ke multaj ĉeestantoj estis movadaj novuloj kaj la lingvokono ne sufiĉis? Eble. Sed ni konsciu, ke Kubaj E-kongresoj okazas en ĉiu

tria jaro, kaj intertempe novuloj havas tempon je sia dispono por lingve maturiĝi kaj pere de la diversaj kursoj kaj pere de la regionaj kaj diverstipaj renkontiĝoj, kiuj devas esti la unuaj ŝtupoj por atingi kongresan nivelon. Enskribiĝi en regula kurso kaj tuj pagi kongreskotizon por nur okupi lokon en kongresejo ne favoras la evoluon de la enlanda movado. Ĉefa trajto de kongresano devas esti la aktiveco, kio implicas lingvoregadon.

Gravan rolon en la preparado de kongresantoj ludas kaj la lokaj instruistoj kaj la movadaj gvidantoj. Tre baldaŭ post la fino de kongreso devas komenciĝi la preparado por la venonta, kaj tio estu puŝo por atingi pli altan Esperantistan nivelon.

La temo jam estas sur la labortablo de la KEA-estraro, kiu en la lasta komitatkunsido reaktivigis la kategoriigon de membroj, laŭ kiu interalie eblos organizi eventojn kun difinita Esperanta nivelo. Sed la praktika sukceso de tiu agado dependas ĉefe de la membroj mem, ĉar samkiel kongresoj ne povas okazi sen kongresanoj, la kategoriigo de membroj ne povas ekzisti sen kategoriigitaj membroj.

En la tempa horizonto estas tri jaroj ĝis la 6a kongreso, por fariĝi kapablaj lingvoregantoj kaj aktivi kiel kongresanoj. Ni ne prokrastigu la preparadon. [NORBERTO DÍAZ GUEVARA]

Foto: Norberto Díaz Guevara





### Utiligo de Esperanto en internaciaj rilatoj

*Teksto de la prelego de Maritza Gutiérrez González, estrarano pri Landa kaj Regiona Agado en UEA, kaj kasistino de KEA, dum la 5a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio okazinta en Havano de la 3a ĝis la 6a de marto 2005.*

“Faktoj pli elokventas ol argumentoj”, jen ĉi-na proverbo kiu same validas por la E-movado. Se oni retrorigardas la historion de nia komunumo, eblas vidi ke malgraŭ ĉiuj negativaj prognozaj de pesimistoj, kiuj neniam mankas, la movado pretervivis malfacilajn etapojn kaj progresis.

Universala Esperanto-Asocio, nia tegmenta organizaĵo havas strategian laborplanon de 2001 ĝis 2010 kies bazo alstrebas tri ĉefajn agadkampojn, ili estas:

**1. Informado**, kiu celas konsciigon pri Esperanto kaj pri la aspektoj de internacia komunikado;

**2. Instruado**, kiu ampleksas je interkultura edukado de la fenomeno Esperanto;

**3. Utiligado**, kiu rilatas al agado per Esperanto, kies bazo estu stabila kaj dinamike evoluanta. Utiligado signifas atingi, ke la celataj homoj trovu ion valoran kaj interesan per sia uzado de la lingvo.

Precize pri temo ligata al tiu ĉi agadkampon mi volas dividi hodiaŭ kelkajn ideojn kiuj flugas tra la esperanto komunumo kun pli aŭ malpli da forto, sed kies valoro devas esti pli funde esplorita tiel ke ni ĉiuj ellernu kaj praktike montru al la neesperantista mondo kial ni estas kaj ankoraŭ restas esperantistoj, kaj kial valoras lerni esperanton.

De antaŭ kelkaj jaroj mi havis la okazon tralegi ege interesan libron kiu devus esti studata de ĉiuj esperantistoj. Temas pri *La fenomeno Esperanto* de William Auld. El tiu libro mi ĉiam memoras ege spritan paragrafon, kiu reliefigas la problemon de internacia

komunikado. El ĝi mi volas citi fragmenton kie aperas jena anekdoto:

*“Mi iam sidis sur kafeja teraso grekinsula. Apude sidis gejunula rondo internacia. Unu el ili, usonano, estis la sola indiĝena parolanto de la angla, sed la angla estis ilia konversacia lingvo. Estante mem indiĝena parolanto de tiu lingvo, mi zorge atentis dum unu horo ilian interparoladon. Ĝi komenciĝis tre vige, kun multa ridado, kaj fine de la horo, post iom da silenta rigardado al la maro, la grupo dispartiĝis kaj foriris du- aŭ triope. Mi sentis, ke la renkontiĝo iagrade fiaskis. La fakto estas, ke la vortprovizo de la neangloj estis vere limigita: la samaj kliŝaj frazoj ripetiĝis plurfoje, ĝis ili ne plu estis adekvataj... Tiu okazaĵo aspektis al mi kiel mikrokosmo de la normalaj internaciaj rilatoj, antaŭ ĉio je la persona nivelo.”*

Tiamaniere mi volas ilustru realan problemon, kies solvon ni ne celas antaŭvidi, ĉar pluraj faktoroj influas kaj longe influos ĝian ekziston. Tamen, alproksimiĝo al la esperantista realo kie oni praktikas konkretajn manierojn salti la lingvan baron estas ĉiam inspiriga kialo por nia ĉiutaga enmovada laboro.

La jaro 2004 estis ege aktiva rilate la temon de internaciaj rilatoj kaj la rolo de Esperanto por tia celo, kiu rekte aŭ malrekte kuŝas en la vivo de milionoj da homoj kaj tre aparte de ni, Esperantistoj. Tion mi povas aserti ĉar la fakto, ke ni estas Esperantistoj, membras en komunumo diaspora, disa tra la tuta mondo kaj en malsamaj landoj, igas



nin portantoj de lingva konscienco, ni ĉiuj sentas la bezonon komunikiĝi kun alilandanoj, homoj el malsamaj ideoj, kulturoj, religioj, lingvoj, sendiskriminacie kaŭze de tiu diverseco. Ĝuste pro tio ni lernis la lingvon. Tamen, ni revenu al la demando: Kiel ni povas utiligi Esperanton en internaciaj rilatoj? Ne kredu ke temas pri supera koncepto aŭ interŝtata celo. Ni intencas pritrakti kelkajn ideojn kaj rigardi ilin je la nivelo nia, de simplaj homoj. Eĉ se ni ne plene konscias pri tio, internaciaj rilatoj estas la plej aŭtoktona esprimo de interŝtataj rilatoj, ĉar tiaj baziĝas ankaŭ en la rilatoj inter individuoj.

Kiam uzanto de Esperanto korespondadas aŭ retmesaĝas al eksterlanda esperantisto, tio estas internaciaj rilatoj. Kiam ni legas libron kreitan en alia lando, aŭskultas radioelsendon aŭ havas amikon en eksterlando, ĉio ĉi estas internaciaj rilatoj. Pro tio ni devas konscii, ke internaciaj rilatoj estas unuavice, rilatoj inter individuoj, kaj ĝuste ni, Esperantistoj celas tion, la internaciajn rilatojn kaj ofte praktikas ilin kiam ni kultivas la fratecon, amikecon, solidarecon. Tiel plifortiĝas nia sento de aparteno al komunumo kies lingva intereso estas alta.

Tamen la agado por Esperanto ne estas nur interpersona, sed ankaŭ interkolektiva. Rezulto de kolektivaj decidoj estas la ekzisto mem de diversaj asocioj kies strukturoj estis kreitaj por organizi la laboron favore al Esperanto tra la tuta mondo, tio estas landaj kaj fakaj asocioj.

Aliflanke, rezulte de la interkolektiva laboro kaj la persona manifestiĝo de tiu laboro, formiĝis tio kion oni nomas Esperanto-kulturo, kiu estas unika maniero rigardi kaj percepti la mondon, kiu venas el utiligo de nia lingvo. La Esperanto-kulturo estas efektiva instrumento por la interhomaj rilatoj kaj en si mem, ĝi konsistigas tutan reton de internaciaj rilatoj, sed internacia lingvo povas esti efika instrumento por internaciaj rilatoj

surbaze de kulturaj normoj, kies respekto estas nepra por efektiva komunikado.

Ni kutime argumentas, ke per Esperanto ni povas interrilatiĝi kun homoj diversnaciaj surbaze de lingva egaleco, kio estas fakto, sed ni devas konscii, ke tio ankaŭ dependas de niaj lingvaj kapablo kaj scio. Se ni sukcesas pli bone regi lingvon, kiun ajn lingvon, ni estos avantaĝaj antaŭ tiuj homoj kiuj ne posedas saman lingvoscion, sendepende de la oratora kapablo, kio estas tute alia situacio. Tamen, pro la fakto ke nia lingvoscio komenciĝas en la sama deirpunkto, ni povas aserti ke ekzistas lingva egaleco, eĉ se ĝi estas relativa ekde la vidpunkto de kapablo. Ĝuste tial ni ne povas forgesi, sed kontraŭe, ni devas eĉ emfazi, ke Esperanto ebligas lingvan egalecon en homaj rilatoj pro tio ke ĝi alportas egalajn ŝancojn por homoj de malsamaj lingvoj, kaj tio sendube estas grava paŝo en la ĝustan direkton.

Dum la lastaj jaroj kaj en diversaj eventoj tutlandaj kaj internaciaj oni debatas pri la rolo de esperanto en internaciaj rilatoj, kaj kreskas la konscio pri tio ke Esperantistoj devas defendi plurlingvecon kiel bazo, por ke la uzo de naciaj lingvoj ne malpliĝu.

Sed kiu estas Esperantisto? Esperantisto estas ne nur persono kiu parolas Esperanton laŭ la deklaro de Bulonjo-sur-Maro en 1905, kiu, cetere, ĉijare festas sian centjariĝon. Esperantisto estas persono kiu sentas apartenon al la Esperanto-komunumo laŭ esprimas la Manifeston de Raŭmo. En la praktiko oni devas emfazi, ke tia aparten-sento estas malfacile realigebla kiam temas pri internaciaj organizaĵoj. Pro tio ĉiam emfazendas, ke ekde la unuaj lecionoj ni devas labori por edukado de la novaj membroj pri nia movado, historio, kulturo kaj aliaj elementoj kiuj iom post iom igas la homon senti, ke ili apartenas al vera komunumo, movado, familio.



Sed aliflanke, oni povis kompreni, ke la termino Esperantisto estas multe pli vasta ol oni povas imagi, tial ke ĝi implicas certan aliron al la mondo, certan pensmanieron kaj konduton.

Kaj precize ni, Esperantistoj, regule aplikas la lingvon en internaciaj rilatoj kiam parolas kun homo el malsama kulturo en la respekto de li kaj de lia kulturo.

Pli kaj pli estas necese, ke la diversaj landaj asocioj, kluboj, lokaj organizaĵoj kaj individuoj konsideru ene de siaj prioritataj edukaj agoj, la transdonon de praktikaj iloj al la Esperantistoj kiel pli efikigi la uzon de Esperanto en la ĉiutaga vivo. Multaj homoj interesiĝas pri lernado de la lingvo kaj starigas al si la demandon kial ellerni ĝuste Esperanton. Kiam homo lernas kiun ajn lingvon evidentas, ke tiu persono interesiĝas pri interkomunikado kun homoj alilingvaj, kio signifas starigon de internaciaj rilatoj, do, kiel utiligi la lingvon en internaciaj rilatoj. Diversaj homoj, ekzemple, radioamatoroj aŭ filatelistoj, havas motivon tute klaran utiligi internacian lingvon por plivastigi siajn kontaktojn en la mondo, sed aliaj ne tre klare povas vidi eventualajn profitojn.

Surbaze de la supra koncepto de internaciaj rilatoj oni povus iel prikonsideri kelkajn manierojn:

Interne de propra lando oni povas kontakti personojn kaj viziti regionojn, kiuj alimaniere estus malprobable kontakti aŭ viziti. En nia lando tiu estas efektiva praktiko, kiu bone funkcias de pluraj jaroj. Multaj el ni spertion kaj sentas, ke ni havas kvazaŭ familianojn, kiuj kaze de bezono kaj eĉ por distraĵoj celoj pretas gastigi nin. Sendube tiu praktiko donas al ni unikan ŝancon travivi spertojn kaj starigi interpersonajn rilatojn.

Je internacia nivelo ekzistas la delegita reto de UEA aŭ pasporta servo, kiuj igas Esperantiston ne senti sin sola en fremda lando aŭ loko. Tre ofte vojaĝantoj estas trans-

donitaj de unu al alia Esperantisto ene de iu lando. Tio estas utiligo de esperanto en internaciaj rilatoj. Ĉiujare okazas centoj da kongresoj, konferencoj, renkontiĝoj kaj aliaj eventoj organizitaj de Esperantistoj por Esperantistoj ene kaj eksterlande. Por vojaĝantoj kiuj disponas la tempon kaj rimedojn tiu estas agrabla maniero pasigi tempon, kio signifas ke por turismo Esperanto estas utila.

Pluraj homoj havantaj specialan intereson aŭ hobion, trovas tre alloga pere de Esperanto internacie plivastigi sian praktikadon de tiu hobbio. Ekzistas diversaj fakaj organizaĵoj, kiuj kutime eldonas propran organon kaj kunligas entuziasmojn en multaj landoj, inter alie estas la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Internacia Naturista Organizo Esperantista, Skolta Esperanto-Ligo kaj aliaj.

Krome, oni povas ĉiutage aŭskulti radio-programojn en Esperanto, jen Radio Ĉina Internacia kaj Pola Radio, kiuj disaŭdigas ĉiutagajn programojn ege interesajn; ankaŭ Vatikana Radio, Radio Havano Kubo kaj Radio Roma, kiuj nuntempe disaŭdigas programojn en Esperanto, sen mencii la diversajn interretajn programojn aŭskulteblajn de tiuj, kiuj disponas retajn eblecojn.

Kompreneble, unu el la plej bonaj manieroj ekzerci la lingvon kaj praktiki internacian komunikadon profitante la lingvokonojn, estas la internacia korespondado. Sennombraj estas la vivlongaj amikecoj, kiuj kreiĝis per korespondado en Esperanto. Ne estas malfacile kontakti kun simpatiuuloj ie ajn en la mondo; preskaŭ ĉiuj Esperanto-revuoj prezigas anoncetojn de korespondemuloj. Ekzistas la nomata Koresponda Servo Mondskala, kiu helpas al tiuj dezirantaj kontaktojn.

Resume oni povas aserti, ke tiu kiu volas, povas ĉiutage utiligi Esperanton tiamaniere. Sed ofte ni ne konscias nek konsciigas la homojn pri tiaj realaj eblecoj.



## Konkludoj

Jam en la fino de mia hodiaŭa prezento mi volas reemfazi kelkajn ideojn ĉiam revenantaj al mi. Mi firme kredas, ke ni kiel Esperantistoj havas la devon kontribui al kreskado kaj progreso de nia movado kreante novajn Esperantistojn; ni devas senĉese argumenti por konvinkadi, por persvadi, por varbi homojn al nia movado kaj laŭeble por prise-mi en medio kulture kaj lingve preparita, tute konscie pri la celoj allogi personojn lingve motivitajn. Nur tiam kaj ankaŭ tiel ni povos vere ĝui la lingvon, pli efike utiligi ĝin en la interhomaj kaj internaciaj rilatoj.

Ni ne povas forgesi, ke ni estas ankaŭ portantoj de la lingva konscienco de nia ge-

neracio. Ni estas ĉi tie, ĉar ni lernis la lingvon, kaj iamaniere ni konsideris tiun socialan problemon multe pli ol aliaj. Ni, per nia Esperanto-praktiko komprenas la internacian lingvan komunikadon kaj ĝiajn implicojn pli bone ol multal aliaj. Tio siavice signifas, ke ni havas respondecon antaŭ la mondo disvastigi la ideojn, kiujn tra unu jarcento evoluigis la Esperanto-movado.

Pro tio kadre de tiu ĉi kongreso de la Kubaj Esperantistoj, mi invitas vin mediti pri tio, kiel ni, unuope kaj kolektive, povas kontribui al la celoj komunaj de la internacia Esperanto-movado. Kiel utiligi la lingvon? La vojo estas signita, de ni dependas ĝin efektivi, persiste kaj optimisme.

---

## La kongreso resume

De la 3a ĝis la 6a de marto 2005. Muzeo de Historio de la Sciencoj "Carlos J. Finlay", Malnova Havano, Urbo Havano. **Kongresatemo:** "Esperanto: realo kaj estonteco" estis pridebatita en kvin laborkomisionoj: informado, instruado, faka agado, kulturo, evoluo. **Partoprenintoj:** Partoprenis 104 Kubaj kongresanoj el 10 provincoj kaj 3 eksterlandaj gastoj el Meksiko, Belgio kaj Francio. Okazis 23 aranĝoj. Ĉeestis kaj la malfermon kaj la fermon reprezentantoj de la Ministerio pri Kulturo, Kuba Libro-Instituto, Fremdlingva Eldonejo José Martí, Radio Havano-Kubo, Ministerio pri Edukado. La evento trovis spacon en la amaskomunikiloj: Radio Rebelde, Radio Metropolitana, Radio Havano-Kubo, Prensa Latina, *Somos Jóvenes*, AIN (Nacia Informagentejo), Habana Radio, Radio Ciudad de La Habana. **Ekspozicio:** "Centjarigo de Esperanto en Kubo". **Prelegoj:** Maritza Gutiérrez González: "Utiligo de Esperanto en internaciaj rilatoj"; Norberto Díaz Guevara: "Oftaj eraroj de Kubanoj parolante la internacian"; Julián Hernán-

dez Angulo: "Strategio por bone lerni lingvon"; Juan Ramón Rodríguez Gómez: "Disvastigo en Karibio kaj Centra Ameriko"; Martín Castro López: "Pripensoj rilate al E-instruado"; Olga Lidia Meneses Duarte: "Kiel profiti la ŝancojn de E en interreto"; Juan L. Besada Toledo: "Plej elstaraj verkistoj de la 20a jarcento"; Alberto García Fumero: "Sugestoj pri tradukado"; Vilhelmo Lutermano: "Perspektivoj de la E-movado en la nuntempa mondo". **Fakaj kunsidoj:** "Instruado", "E kaj turismo". **Prezentoj:** Infanprojekto "Juna Amiko", Holguín; Yumeiho-terapio, Urbo Havano; E-klubo, Universitato de Informadikaj Sciencoj. **Akceptoj:** Ĵurnalistoj kaj invititoj. Membroj Subtenantoj. **Kultura Vespere:** Kuba Libro-Instituto, Palacio del Segundo Cabo, Malnova Havano. **Libroservo** funkciis dum la tuta kongreso. **Ekskurso:** Promenado tra la historia parto de la urbo, sub la gvidado de Manuel O. Rodríguez Rábago. **Didaktika konkurso:** "Festivalo de la leciono", gvidita de Marta E. Alonso Gutiérrez kaj Pedro Fernández Rodríguez. **Adiaŭa tagmanĝo** por ĉiuj delegitoj kaj gastoj. [ALBERTO F. CALIENES]

### Pripensoj rilate al Esperanto-instruado

*Prelego de Martín Castro López, dum la 5a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio. Havano, marto 2005.*

El la tri laborkampoj de Esperanto: informado, instruado kaj utiligado, nia prioritato devas esti la instruado, ĉar ĝi estas la fundamento de ĉio. La instruado de Esperanto estas la mekanismo, kiu ebligas pluekziston kaj plukreskon de la Esperanto-komunumo. Andreo Cseh prave diris, ke la bazo por disvastigo de Esperanto estas instruado.

Laŭ PIV la instruado estas la arto de tiu, kiu instruas kaj, kiel vi scias, Esperanta instruanto nepre bezonas tre bonan scion kaj kleron pri la E-lingvo kaj la kulturo de la Esperanta movado; tamen instruanto sen helpo de la instrua fako de nia asocio, ne povas garantii plenan sukceson. Tiu fako devas provizi je taŭgaj instrumaterialoj al niaj instruantoj, apogi kaj helpi ilin disvastigi en la lernejoj de la lando la lernadon kaj la uzadon de la lingvo.

Ĉu la agado de niaj geinstruantoj estas profesie kunordigata kaj konvene helpata de nia instrua fako? Kiajn problemojn havas ni rilate al instruado, lernejoj kaj instruantoj? Ĉu estas bona ideo krei ILEI-sekcion nialande por helpi instruantojn?

Sendube tre granda respondeco kuŝas sur la ŝultroj de la instruantaro, ĉar ili estas la unuaj, kiuj renkontiĝas kun studentoj kaj varbas novajn membrojn por nia asocio. Ni devas entuziasmigi la gejunulojn ekde la unua momento pere de dinamikaj lecionoj uzante Rektan Metodon, por ke ili partoprenu aktive dum la lecionoj. Bedaŭrinde Esperanto foje ne plu interesas la junularon,

ĉar ĝi ne donas aliron al kariero aŭ laborposteno, kaj tiel ne promesas perspektivojn por la estonteco. Do, pro tio gravas, ke ekde la unua renkontiĝo la instruisto invitos ilin partopreni aktive kaj entuziasme en la kulturaj aranĝoj de la asocio, sed ne nur la instruisto respondecas pri tio; respondecas ankaŭ la organizantoj kaj la respondeculoj de la kulturaj prezentoj.

Kvankam ĉiam oni laboras celante plibonigi la financon staton de la asocio, prioritato ne nur devas esti rekotizigi la membraron. La respondeculoj pri edukado kaj kulturo devas ofte viziti la lernejojn por atenti la novajn membrojn kaj labori kun ili. Estus bone pripensi, ke anstataŭ labori por konvinki ne Esperantistojn, ke nia lingvo estas lerninda lingvo, ni penu konvinki ilin, ke la lingvo ekzistas, kaj ke multege da homoj, lerninte ĝin en kelkaj monatoj, jam parolas ĝin tre flue kaj plene pri ĉiu temo.

Kiam ni informas pri Esperanto, homoj petas al ni diri ion en Esperanto; konsilindas diri la jenajn vortojn: "Amikeco", "amo", "paco", "homaro" kaj "mondo"; kaj la jenan sloganon uzante la samajn vortojn: "Amikeco, amo kaj paco por la homaro en la mondo".

La 24an de majo 1930 Sro. Andreo Cseh kune kun gesinjoroj Isbrücker fondis la Internacian Cseh Instituton. En 1952 la nomo estis ŝanĝita al Internacia Esperanto Instituto kun la celo instrui Esperanton pere de

*(daŭrigo sur paĝo 11)*



## Demandaro por la distanca kurso

Nomo: \_\_\_\_\_ Poentoj: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_ Poŝtkodo kaj provinco: \_\_\_\_\_

### 1. Akuzativo

En la sekva teksto aldonu la mankantajn finaĵojn.

Kelk \_\_\_\_\_ minut \_\_\_\_\_ post la kvar \_\_\_\_\_ ni renkontiĝis antaŭ la katedral \_\_\_\_\_ . La ŝarĝaŭt \_\_\_\_\_ ni restigis en iu \_\_\_\_\_ flank \_\_\_\_\_ strat \_\_\_\_\_ , kaj per du taksi \_\_\_\_\_ veturis al la ĉemar \_\_\_\_\_ kampadej \_\_\_\_\_ , kie maten \_\_\_\_\_ la knaboj luis domet \_\_\_\_\_ . Ti \_\_\_\_\_ kampadej \_\_\_\_\_ oni konstruis ne por riĉuloj. Sur la teren \_\_\_\_\_ maldense staris palm \_\_\_\_\_ kaj ĉirkaŭ dudek lign \_\_\_\_\_ domet \_\_\_\_\_ , kelkfoje kun sunombreloj super la teras \_\_\_\_\_ , tenisesejoj, kaj ŝtonaj vojetoj.

### 2. Prepozicioj

Elektu po unu el la sekvaj prepozicioj: al, ĉe, da, de, dum, el, kun, per, po, por, pro. Atentu, ke prepozicio estu nur unufoje uzata.

- Fritz estas germano, \_\_\_\_\_ Berlino.
- Dum la festo li trinkis tutan botelon \_\_\_\_\_ ĉampano.
- La gefratoj ricevis \_\_\_\_\_ kvin eŭroj \_\_\_\_\_ la onklo kaj ĝoje dankis lin \_\_\_\_\_ la donaco.
- Henriko vojaĝas \_\_\_\_\_ aŭto \_\_\_\_\_ la tuta familio.
- Ili veturas \_\_\_\_\_ Francio \_\_\_\_\_ ferii tie \_\_\_\_\_ marbordo.

### 3. Transitiveco de verboj

Aldonu la mankantajn finaĵojn laŭnecese. Uzu -is, -igi, -igis, -iĝi, aŭ -iĝis.

- Kiam komenci \_\_\_\_\_ la festivalo?
- Marta pas \_\_\_\_\_ du semajnojn en Parizo.
- Karese la patrino sukcese endorm \_\_\_\_\_ sian bebon.
- Bonvolu star \_\_\_\_\_ omaĝe al la mortintoj.
- Morgaŭ mi devos vek \_\_\_\_\_ je la sesa matene.

## **Demandaro por la distanca kurso** (daŭrigo)

- e) La buso halt \_\_\_\_\_ antaŭ mia domo kaj du junuloj elbus \_\_\_\_\_.
- f) Kion ni faru por feliĉ \_\_\_\_\_ lin?
- g) Ŝi kviet \_\_\_\_\_ kaj ĉes \_\_\_\_\_ plori.

### **4. Tabelvortoj**

Uzu la sekvajn vortojn en la taŭgaj lokoj: ke, kia, kio, kiu. Aldonu gramatikajn finaĵojn, se necese.

- a) \_\_\_\_\_ vi opinias pri tiu afero?
- b) Mi opinias, \_\_\_\_\_ la vortoj, \_\_\_\_\_ vi diris, estas tre saĝaj.
- c) Fakte mi tute konsentas kun tio, \_\_\_\_\_ mi aŭdis.
- ĉ) Ĉu vi scias, \_\_\_\_\_ la soldatoj mortis? Ne, \_\_\_\_\_ diris tion?
- d) Ĉu vi scias, \_\_\_\_\_ soldatoj mortis? Jes, Marko kaj Adamo mortis.
- e) \_\_\_\_\_ estis la kuko, \_\_\_\_\_ via patrino aĉetis hieraŭ? Bonega. Ĉu vi deziras, \_\_\_\_\_ mi donu al vi peceton?

### **5. Afiksoj**

Uzu la sekvajn afiksojn en la taŭgaj lokoj: -ad, bo-, -ebl, -eg, eks-, ge-, -il, -ing, -ist, mal-, -uj. Aldonu gramatikajn finaĵojn, se necese.

- a) La patro de via edzino estas via \_\_\_\_\_ patro.
- b) Ne metu \_\_\_\_\_ plenajn botelojn en la porpapera rub \_\_\_\_\_.
- c) Aspirino estas la plej konata kurac \_\_\_\_\_.
- ĉ) \_\_\_\_\_ patroj devas kunlabori kun instru \_\_\_\_\_ en la eduk \_\_\_\_\_ de infanoj.
- d) La lasta filmo de tiu aktoro ĝuis grand \_\_\_\_\_ sukceson en la kin \_\_\_\_\_ de Eŭropo.

---

Forprenu tiun ĉi paĝon, kompletigu la frazojn, kaj sendu la folion al

**Kuba Esperanto-Asocio**

**Marta Alonso Gutiérrez, (Distanca Kurso)**

**Apartado Postal-5120, 10500 Ciudad de la Habana**

Vi ricevos la sekvontajn materialojn post korektado de la eraroj kaj ekzercado pri la koncerna gramatikelemento.



## Pripensoj rilate al ...

(daŭrigo el paĝo 8)

la **Cseh-metodo**, la plej konata metodo de la E-medio. Pro tio ili aranĝas Cseh-metodajn kursojn en diversaj landoj kadre de Universalaj Kongresoj, preparas taŭgajn instruantojn kaj organizas pedagogiajn seminariojn kun partopreno de instruantoj el diversaj landoj.

Ĉu eblas, ke kelkaj instruantoj el nia lando fariĝos Cseh-metodaj instruistoj? Kial niaj spertaj instruantoj ne aranĝas seminarion por prepari aliajn por estontaj ILEI-ekzamenoj? Ĉu estas celo de niaj instruantoj pretigi sin por ekzamenoj de ILEI? Ĉu eblas havi sekretariejon de ILEI en Kubo por diplomigi Cseh-instruistojn ĉi tie? Ĉu eblas, ke sperta Kuba E-instruisto iam povu vojaĝi alilanden por instrui la internacian lingvon? Kion vi opinias? Ĉu tio dependas de vi mem?

Oni diras, ke Zamenhof kreis la lingvon, kaj ke Andreo Cseh la metodon instrui ĝin. Esperantisto, kiu havas ardan kaj tutkoran amon al Esperanto ne povas permesi, ke niaj gvidantoj, kiuj reprezentas nin, ne parolu la lingvon, ĉar ĉiuj el ni scias, ke lingvo troviĝas en vivdanĝero kiam ĝiaj parolantoj ne parolas ĝin, eĉ kelkfoje hontas uzi ĝin publike. Esperantistoj ĉiam devas interparoli en Esperanto. Niaj aranĝoj kaj kunvenoj devas esti ĉiutaga pruvo, ke Esperanto estas vera lingvo.

Paroli bonege Esperanton ne signifas povi instrui ĝin efike, tamen oni scias, ke la kampo de la poresperanta kaj peresperanta agado estas tre vasta; ĝi donas multajn eblojn kaj ĉiu agemulo trovas konvenan spacon en nia asocio; tamen, en la praktiko oni kelkfoje forlasas aliulojn. Stimulante al aktivado la Esperantistojn, ni garantios, ke homoj ne forlasu niajn rondojn, ke ili restu apud ni laborante por plifortigi la movadon.

La Esperantismo estas tre nobla ideo pro sia demokratieco kaj internacieco. Esperantisto celas interkompreniĝon de homoj kaj de popoloj, celas la pacan vivon sen militoj. "Esperanto estas mi" estas esprimo lastatempe aŭdebla en aranĝoj kaj sendube ĝi estas bonega aplikebla slogano; sed kelkfoje homoj agas nur pensante en sia propra intereso kaj tiel la slogano fariĝas "Esperanto estas por mi". Kaj kiel ni ĉiuj scias, Esperanto estas nenies posedaĵo, ĝi estas ĉiesa lingvo. Do, "Esperanto estas por ĉiuj".

Memoru, ke bona Esperantisto aranĝas kurson por aliaj homoj kaj varbas novajn adeptojn por la movado; li donas inspiran impulson al aliaj Esperantistoj; li garantias la estontecon de la internacia lingvo. Ĉu en la movado aktivus lernanto via? Do, kial vi ne fariĝas instruanto por aligi pli da membroj al nia movado? Ne funkcias ŝtuparo sen ŝtupoj kaj kiam tio okazas, la disfalo estas neevitebla.

Nuntempe preskaŭ ĉiuj instruantoj de Kuba Esperanto-Asocio uzas la rektan metodon por instrui la lingvon celante rapidan paroligon kaj komuniĝon de la lernantoj. Tamen oni ne devas forgesi, ke niaj kursanoj devas paroli pli multe ol la instruanto mem dum la lecionoj, kaj la nacian lingvon oni uzu nur ĉe ekstrema neceso.

Mi konsilas instrui la lingvon de paco kaj amo ligante ĉiun instruaĵon al agrabla, amuza travivaĵo. Por ekzerci la penskapablon kaj la parolkapablon en Esperanto, la ĉefa parto de la leciono nepre devas esti konversacio kaj dialogoj inter la lernantoj kaj la instruisto; ankaŭ inter la lernantoj mem, sed ĉiam sub la kontrolo kaj gvidado de la instruisto.

Preparu bone kaj detale la lecionojn. Se tion vi faros, vi atingos tre bonan sukceson.

Ni profitu ĉiujn vojojn kaj ĉiujn fortojn por plifortigi kaj evoluigi Esperanton!

### Maritza Gutiérrez González



*Prezidantino de KEA dum ses jaroj, ekonomikistino kaj ĵurnalistino, membrofondinto de KEA, fondinto kaj nuna estro de la E-redakcio de Radio Havano Kubo, plurjara ĝenerala sekretario kaj estraranino de KEA, Maritza estis elektita membro de la UEA-estraro, en kiu ŝi respondecas pri Landa kaj Regiona Agado. Ŝi komplete trovis liberan tempon inter tiom da okupoj, por Avanca intervjuo.*

#### **Avanco: Ĉu estis surprizo por vi la kandidatiĝo por UEA-estraraneco?**

**MGG:** La demando pri kandidatiĝo por UEA-estraraneco jam de antaŭ kelkaj jaroj iu faris al mi en UEA, sed kompreneble, mi neniam serioze pripensis pri tio, ke Kuba esperantisto havu tian eblecon. Evidente, min ankaŭ influis la ĝenerala penso, ke UEA estis Eŭropo-Centra organizo, kio dum la lastaj jaroj pli kaj pli aliras pli malferman direkton. Verŝajne pro tio ne tre surprizis min la propono de la elekta komisiono, tamen, mi ne atendis elektiĝon.

#### **Kutime aŭdiĝas komentoj pri la troa Eŭropeco de Esperanto; kion signifas por vi la estraraniĝo de Kubano por la unua fojo en UEA?**

Ĝuste pri tio mi ĵus esprimis, ke mi ne atendis elektiĝon. Se oni rigardas la lastajn jarojn de la estrara konsisto, vi povas rimarki, ke la eniro de Afrikano en la estraro iel skuis la historian fakton pri la Eŭropeco de UEA, ankaŭ Azianoj pli malpli regule enestis la estraron dum la lastaj jardekoj. Tamen, Latinamerikanoj daŭre mankis, kaj ankoraŭ mankas konsiderante la enorman potencialon de la regiono. Pro tio mi povas taksi, ke la estraraniĝo de Kubano estas fakto neniam imagebla de ni mem, kaj por mi persone, ĝi konsistiĝas grandan kompromison

klopodi digne plenumi taskon, kiu cetere estas tre vasta, sed ja grava por instigi kaj iel gvidi la agad-direktojn de nia tegmenta organizo ene de la landaj kaj regionaj movadoj, aparte en tiuj malfortaj.

#### **Kiu estas la etoso en la UEA-medio pri la E-agado en Kubo?**

La fakto ke oni elektis min, ĝis tiam, prezidantino de KEA, ankaŭ spegulas la sintendon ĉe UEA-medio pri la agado de la Kuba movado, ties prestiĝo kaj seriozececo dum pli ol 25 jaroj. Miaopinio, oni alte taksas la laboron de la Kubaj esperantistoj kaj aliflanke, oni ankoraŭ multon esperas de ĝi, kaj mi povas aserti, ke talento kaj organiza kapablo ekzistas en la Kuba movado por entrepreni pliajn taskojn kaj aktivaj ne nur enlande, sed ankaŭ en la regiono.

#### **En sia salutmesaĝo al la 5a kongreso de KEA, Renato Corsetti esprimis sian konvinkon, ke Kubo kapablas gvidi la movadon en tiu ĉi mondoregiono. Kion vi opinias pri la eventuala gvida rolo de Kubo en la E-movado Centroamerika?**

Mi povas nur aldoni, ke tia konvinko baziĝas sur realaj faktoj efektivigitaj de KEA dum jaroj da senĉesa kaj entuziasma agado, malgraŭ pluraj materiaj malfacilaĵoj. Kubanoj estas ja persistemaj kaj obstinaj, do,

esperantistoj. Tial, oni jam entreprenas kelkajn gravajn paŝojn por realigi novajn planojn kaj projektojn por la Centramerika kaj Karibia regiono. La nuna prezidanto de KEA, Julián Hernández, estas homo tre kapabla kaj entuziasma, kiu konscias pri la rolo de KEA ene de la regiono. Aliflanke, Juan Ramón Rodríguez, membro de la Amerika Komisiono, kaj la tuta stabo kunlaboras por tiu celo.

### Kiuj estas viaj planoj rilate al Landa kaj Regiona Agado?

Kiel vi scias, UEA havas strategian laborplanon aprobitan jam antaŭe ĝis la jaro 2010, kompreneble, surbaze de tiu laborplano kaj taskoj deciditaj dum la lastaj komitatkunsi-

doj en Gotenburgo kaj Pekino, mi starigis laborplanon, kiu celas interalie, pli enplekti la landajn asociojn en skizitaj agadlinioj de UEA kaj konsiiciigi ilin pri la esenca agado ankaŭ desube, ĉar la lokaj grupoj kaj landaj movadoj konsistigas pilierojn de nia tegmenta organizo. Ni bonvenigas iniciatojn de individuoj kiuj pretas ilin entrepreni, sed samtempe ni devas konscii, ke la laboro organizita kaj kun difinitaj celoj estas esenca por kiu ajn organizo. Pro tio UEA daŭre okupiĝas pri la landaj asocioj kaj regionaj movadoj, ĉar ili estas niaj kovejoj, tie kie la diligenta kolegaro laboras tagon post tago favore al Esperanto.

Intervjuis: NORBERTO DÍAZ GUEVARA

## novajoj el filioj

• **De la 8a ĝis la 10a de aprilo** okazis en Guáimaro, provinco Camagüey, la Seminario de Aktivula Trejnado. Intervenis dudeko da Esperantistoj el kvin provincoj. La labor-sesioj realiĝis en la Urba Muzeo Ana Be-tancourt, kie estis ekspozicio kaj prelegoj. Gvidis la seminarion Julián Hernández Angulo, prezidanto de KEA. Roberto García Molina, Jorge Luis González Santillán kaj María Elena estis la organizantoj. [JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO].

• **45 Esperantistoj el 4 Kubaj provincoj** (Guantánamo, Holguín, Urbo Havano kaj Santiago de Cuba), renkontiĝis en la Popola Kampadejo "Las Golondrinas", de la 22a ĝis la 24a de aprilo, por festi la 10an datrevenon de la loka E-grupo. Konsistigis la programon Interkona kaj Arta Vesperoj, prele-

goj, kaj... rostita porko! Reprezente de la Nacia Estraro ĉeestis Julián Hernández, KEA-prezidanto. [JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO].

• **Provinca Filio Urbo Havano.** La estrarkunsidoj de la filio okazas en la lasta vendredo de ĉiu monato, kaj seminario okazas ĉiumonate en dimanĉo. La estraron konsistigas: Mario Ruiz Karell, prezidanto; Carlos Caesar Ascensio, financo kaj vicprezidanto; César Monreal, edukado kaj kulturo; Lázaro Azcuy, sekretario kaj informado; Eutimio Cauce, administranto de la sidejo. Komisiitoj estas: Yamilé Sánchez, interna komunikado; Maribel Pérez, libroservo; Dalia Delis, aranĝoj; Jorge L. Torres, informado kaj publikaj rilatoj; Bárbaro Lezcano, kulturo. La moto de nia filio: "Ni mem estas Esperanto!". [MARIO RUIZ KARELL].

*Sciigu pri viaj lokaj aranĝoj. Eĉ se mallonge, tio utilas!*



## Lasta akto

Pablo de la Torriente Brau\*

En korta angulo, kie reĝa palmo staris, la viro atendis. Profunda kaj silenta nokto envolvis ĉion. Fore, nur muĝo maskis la silenton je monotona bruo. Lia malhelblua *overall* ombrigis lin. Liaj potencaj antaŭbrakoj, harozaj, grasmakulitaj, apenaŭ videblis. Li estis senmova. Li atendis.

Tiu estis lia korto kaj tiu lia domo, sed en tiu malvarma noktomezo li atendis. En larĝa poŝo, kune kun stupafa manpleno, lia kruda mano de maŝinisto kunpremis tiun paperon hazarde trovitan sur oficeja tablo, antaŭ horo apenaŭ, kiam li iris konsulti la ĉefinĝenieron. Forlasita sur tablo li vidis koverton adresitan al sia edzino, kaj preninte ĝin, nun staris malantaŭ la palmo, en la horo de la tragika rendezvuo. La papero tekstis: "Ĉi-vespere via edzo deĵoras en la maŝinhalo kaj je la dekdua mi ĉiamaniere iros..." *Ĉiamaniere* estis substrekita. La sukerfabrika administranto subskribis ĝin. Li nur havis tempon kuri de la fabrika vilaĝo hejmen kaj posteniĝi funde de la korto. Ankoraŭ lia cerbo malserenis pro surprizo, kolero kaj humiligo. Malantaŭ la palmo li estis nur viro, tio estas, bestio.

Kaj iom antaŭ la dekdua aperis la aliulo. Leviganta sur la remparo ties kapo ektime observis la korton kaj la nokton. Tiam, post

senfinaj zorgoj, li saltis. Li vestis kakian ĉemizon. Dorsapogita al la remparo li restis dum momento aŭskultanta la noktajn murmurojn, la bruegojn de sia hasta koro... (de malantaŭ la palmo du stalaj okuloj spionantaj lin abomene konkludis: "Li estas ja kovardo!...") Li zorge antaŭeniris, kaj alvenis ĝis la palmo mem... Strange, sed li ne eksentis la tumultan silenton de la kontraŭulo... Tamen, nur la dikeco de la reĝa palmo disigis ilin kaj en la alto, vento sonigis la palmfoliojn...

Ĉio estis rapida, elektra. La ŝtala mano de maŝinisto ĉirkaŭpremis lian gorĝon kaj sufokis la teruran ektimegon. Kaj tiu barbara bato lasis lin tuj sensenta. La maŝinisto, kruda kaj violenta, ne havis la proponitan paciencon kaj nun staris apude, rigardanta sian sangoplenan pugnon kaj kun senimpresa cerbo. Tiel li restis momente, kvieta, senmova, kvazaŭ trunkoombro, ĉe la penso: "Se mi ne estis povinta paroli kun li, tiam mi parolos kun ŝi." Kaj survoje al la domo, li brutale tretis la falinton... Li iris laŭ la silento kaj nevidebla rapideco de nigra kato.

Jam ĉe la malantaŭa pordo, li haltis. Rara timo estis paralizinta lin. Momente alsaltis lin la maltrankviliga emocio, esti li la amoro, esti tiu, kiun ŝi atendis. Lia koro agi-

\* Pablo de la Torriente Brau [Torjente Braŭ] (1901–1936) naskiĝis en San-Juano, Portoriko. Kvin-jara elmigris al Kubo kun sia familio. Li faris tre bataleman ĵurnalistan laboron. Liaj artikoloj denuncadis la politikan kaj administran koruptecon, la mistraktadon kaj ekspluaton je kiuj oni submetis la humilajn tavolojn. Kune kun Rubén Martínez Villena [Vijena] luktis kontraŭ la registaro de Gerardo Machado [Herardo Maĉado]. Lia tuta verkaro posedas tiun intensan valoron, kiu plenigis lian mallongan vivon kaj ekzempligas lian forpason, okazinta dum milito en defendo de la Hispana Respubliko. Post la Revolucio lia verkaro estis plurfoje publikigita en multaj eldonoj.

tiĝis en perversa espero kaj li eksentis la timon de la adultulo.

Sed li atingis la pordon. Li aŭskultis kaj aŭdiĝis nenio. Li, tamen, sentis sin proksima al ŝi. Li mole prempuŝis la pordon kaj je la malforta ĝemo, jam endome, ĝi respondis per sia karakteriza balanciĝo... Li kviete pensis: "Ŝi atendis lin!..." Kaj la rabio igis lin furioze lanĉi sian larĝan ŝultron ĝis frakasi la pordan riglilon...

Sed antaŭ la dua paŝo, li sentis kuglon en la korpo kaj ŝian voĉon diri: "Kanaĵlo, mi avertis vin..."

Je lia surpriza kaj dolora "Ah!", ŝi plenis spacon da silento kaj miro. Post kiam ŝi ekkure ŝaltis la lumon, li vidis ŝian vizaĝon pleniĝi je nekredibla doloro... Apud li surgenu ŝi diris: "Kial, kial?..." sen ion kompreni ankoraŭ... Sed jam lia vizaĝo, kun ku-

glo en la korpo, ekgajiĝis, gajiĝis kiel vizaĝo de resaniĝanta infano.

Pli ol la pafaĵo, estis la voĉangoro kiu forigis ĉiujn suspektojn. Honta kaj feliĉa li montris al ŝi la paperon kaj restis muta. Kaj ŝi vidis ĝin kaj kriis al li, kun dubo pli dolorplena ankoraŭ: "Sed, ĉu vi legis ĉion? Ĉu vi vidis la mian, kion mi respondis?" Kaj malfaldante la paperon ŝi diris al li: "Jen, rigardu!..."

La papero diris ŝiaskribe: "Kanaĵlo, ne insistu, se vi kuraĝas veni, mi mortigos vin."

Kaj la vira vizaĝo ĉiam pli paliĝadis, sed ĉiam pli klariĝis la rideto sub la nekonsolebla ploro de la genuiĝinta virino...

Elhispanigis: *Kolektivo de supera E-kurso okazinta 2002 en la sidejo de KEA sub la gvido de Alberto F. Calienes.*

## Kalendaro de aranĝoj

2006

**Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (SAEST)**  
Havano, 2006.05.19-21.

2007

**4a Kultura Esperanto-Festivalo**  
Havano, novembro

2008

**1a Tutamerika Esperanto-Festivalo**  
Havano, novembro

2009

**6a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio**  
Havano, novembro

Informoj ĉe:

Kuba Esperanto-Asocio / Poŝtfako 5120, 10500 Havano / [info@esperanto.co.cu](mailto:info@esperanto.co.cu)

Pliajn informojn vi baldaŭ trovos ankaŭ en: <http://www.esiss.co.cu/esperanto/jajabokubo.htm>



# Esperanto en Kubo

- Historio de la Kuba movado
  - Kalendaro de eventoj
  - Radio Havano-Kubo
  - Julio Mangada Roseñorn
  - Fotogalerio
- ... kaj multon pli vi trovos!

<http://www.esiss.co.cu/esperanto/jajabokubo.htm>

## AVANCO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

**Kuba Esperanto-Asocio**

Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo

Telefonoj: +53(7)40 4484; 53 9102 Fakso: 649 8729

[avanco@esperanto.co.cu](mailto:avanco@esperanto.co.cu)